

Francilia federacio Komitatkunsido 29/01/2021

Partopreno

- Michèle Abada-Simon (MAS) ĉeestas
- Pierre Gauthier, vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Marc Giraud, prezidanto (MG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Sylviane Lafargue (SL) senkulpiĝis
- Aurélien Lestage, vic-sekretario (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) senkulpiĝis
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Marianne Pierquin (MP) senkulpiĝis
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ĉeestas

Ekde la antaŭa KK

- La protokolo de la KK de la 11/12/20 estis aprobita kaj enretigita al <https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>
- La ZamFesto estis organizita de Espéranto France la 12/12/20 rete, LPI partoprenis per legado de unu el siaj noveloj.
- La Internacia Konferenco de la NROj ĉe Unesko okazis de la 16a ĝis la 18a de decembro, FLJ ĉeestis kiel reprezentanto de UEA. Li kandidatigis UEA al la LigKomitato de NROj ĉe Unesko, sed sensukcese.
- La dato de la ĝenerala asembleo (ĜA) 2021 estas fiksita al sabato la 20a de marto de la 2a ptm ĝis la 4a. Ĝi okazos ĉu rete, ĉu surloke, ĉu mikse, laŭ la tiamaj sanaj kondiĉoj. La salonoj 1 kaj 2 estis rezervitaj en la domo de asocioj, 5 strato Perrée, ene povas partopreni 17 personoj. Se la ĜA okazas surloke, ni petu la membrojn anonci antaŭe sian partoprenon al la komitato (prefere al LPI) por ke ni povu certigi ne esti pli ol 17.

Organizo

Ĉio, en la nuna periodo, okazas rete.

Diskutlistoj

Ni nun disponas **4 listojn** :

- komitato-francilio@googlegroups.com : la komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com : la oficialaj membroj
- amikaro-francilio@googlegroups.com : la eks-aliĝintoj de Yahoo kaj eks-membroj
- francilio@esperanto-france.org : la eks-aliĝintoj de Yahoo

La 3 unuaj listoj estis kreitaj de MG ĉe Guglo. En tiuj 3 listoj, aliĝoj kaj malaliĝoj estas faritaj de MG kaj de la komitatanoj kiuj havas Guglekonton, t.e. kiuj estis aliĝitaj per retpoŝtadreso ĉe gmail.com. Se vi ne estis aliĝinta per

retpoŝtadreso ĉe gmail.com, bonvolu krei retpoŝtadreson ĉe gmail.com kaj prie informi MG por ke li malaligu vian antaŭan adreson kaj aligu la novan en la 3 listojn. Tiel, ĉiu komitatano povos administri la 3 diskutlistojn.

La 4a listo estis kreita de Espéranto France. Ĝi funkcias per Sympa en servilo administrata de Esperanto France, respondecas Xavier Godivier. En tiu 4a listo, ĉiu ŝajne rajtas mem aliĝi kaj malaliĝi, do ĝi de si mem evoluos kaj pli kaj pli malsimilos al la 3a. François petos detalajn informojn: ĉu oni rajtas de si mem aliĝi kaj malaliĝi, tiukaze ĝi povus anstataŭigi nian liston amikaro? Ĉu aliĝo estas aŭtomata kiam oni membriĝas, neniuj malaliĝas nek aliĝas de si mem, tiukaze ĝi povus anstataŭigi nian liston membraro?

La listoj diferencu per la maniero administri ilin, la rajto aliĝi kaj mesaĝi al ili, la speco de mesaĝoj sendataj al ili. Tiu ĉe Esperanto-France povas esti konektita al la datumbazo Arthur de la membroj de Esperanto-France, do ankaŭ de la francilia federacio, sed tio postulos ankoraŭ laboron. Principe estas unu troa listo, sed ankoraŭ nenio estas decidita ĉi-rilate.

Agadoj kaj eventoj

- Kurso nivelo 1 kun MAS : ne okazas
- Kurso nivelo 2 marde vespere kun MG : plu okazas
- Kurso nivelo 3 marde vespere kun FLJ : plu okazas
- Babilrondo pri elektataj temoj kun Romo la 1an sabaton de ĉiu monato vespere kun MG : plu okazas

Neniu alia evento pro la sana krizo.

Bondeziroj

Ni sendis mesaĝon de novjaraj bondeziroj al la urbestro de Centra Parizo Ariel Weil, al ties respondeculo pri asocioj Ludovic Sage, al la asocio de fervojistoj, al SAT-Amikaro.

Mesaĝoj al lokaj asocioj

Ni sendis mesaĝon al ĉiu loka asocio, kiu estas membro de nia francilia federacio por sendi al ili novjarajn bondezirojn. Samtempe, ni demandis ĉu la asocio plu aktivas, ĉu la paĝo kiu priskribas la asocion en nia retejo estas ĝisdatigenda, kiujn agadojn la asocio organizis en 2020 por noti en la agadraporton 2020.

- Espéranto 91 Essonne : neniuj respondo
- Espéranto 94 : la asocio plu ekzistas sed malmulte aktivas -> ŝanĝi la adreson en la paĝo al sylviane.lafargue@outlook.fr
- Espéranto 78 Le Vésinet : ne estas vera asocio membro de la federacio sed tio ne gravas, kio gravas estas ke ĝi aktivas -> aldoni en la paĝon la nomon Marielle Martin kaj adreson mariellesbrunch@hotmail.com
- ILO 78 : neniuj respondo
- Bondy espéranto 93 : neniuj respondo -> kontakti Elisabeth Barbay

- Espéranto 77 Val de Seine : la asocio ne plu aktivas de multaj jaroj -> forigi la paĝon ?
- Espéranto Epinaŭ Europe EEE 93 : neniŭ respondo -> kontakti Gaston Riera

Komitatano kontaktu la 2 respondeculoj kiuj ne respondis sed probable plu aktivas.

Tamen ĝenas ke asocio priskribita en nia retejo ne respondas al mesaĝoj, ĉar tio povas krei disreviĝon ĉe novulo serĉanta apudan klubon.

Ĉu forigi la paĝon de la asocioj kiuj ne respondis kaj probable ne plu ekzistas? Ni pritraktos tiun temon dum la ĜA.

Mesaĝoj al membroj kaj interesatoj

Ni sendis mesaĝon al la 3 lastaj diskutlistoj ĉi-supre priskribitaj (entute: membroj en 2019 aŭ 2020, aliĝintoj de la listo ĉe Yahoo). Ni sendis novjarajn bondezirojn, informis pri la dato de la ĜA, instigis al realiĝo por 2021 kaj al kandidatiĝo al la komitato. La sama mesaĝo estis sendita retroŝte al homoj kun retroŝtadreso kaj poŝte al la 8 homoj sen retroŝtadreso.

Kandidatoj al la komitato

La komitato enhavas de 9 ĝis 15 komitatanojn. Ĉiuj estas elektitaj de unu ĜA ĝis la sekvanta ĜA, t.e. por proksimume unu jaro.

Ĉu la nunaj komitatanoj decidas kandidatiĝi?

- Michèle Abada-Simon (MAS) JES
- Pierre Gauthier (PG) JES
- Marc Giraud (MG) JES
- Didier Janot (DJ) JES
- Sylviane Lafargue (SL) SE MANKAS IU
- Aurélien Lestage, (AL) Probable jes, sed ne certa, decidus antaŭ la 15an de februaro
- François Lo Jacomo (FLJ) JES
- Didier Loison (DL) JES
- Laure Patas d'Illiers (LPI) JES
- Marianne Pierquin (MP) NUR SE NECESE
- Guillaume Vera-Navas (GVN) JES

Marielle Martin, respondeculo pri Espéranto 78 Le Vésinet, kandidatiĝas.

Frantz Vichot, lernanto de la marda kurso de MG, kandidatiĝas.

GVN petos de iu ekstera kiu povus kaj aliĝi kaj kandidatiĝi.

Jam estas 10 certaj kandidatoj, t.e. pli ol la minimuma nombro. Ne necesas, ke ni kontaktu aliajn homojn por instigi al kandidatiĝo.

Atentu: la listo nepre estu definitiva la 15an de februaro.

Organizo de la ĜA

Invitilo oficiala kun tagordo kaj praktikaj detaloj : redaktota

Agadraporto 2020 : MG estas redaktanta, FLJ aldonos kelkajn frazojn pri sia kurso kaj la matematika foiro, menciendas la kulturaj vesperoj kun laboro pri sonspektaklo

Agadplano 2021: preparota (denove okazigi la eventojn nuligatajn pro la pandemio kiam eblos, novaj projektoj).

Financa raporto 2020 : preparita, baldaŭ sendota de DL

Baloto por elekti la komitaton : preparota kiam la listo estos definitiva

Baloto pri aliaj decidoj : ĝis nun ne estis proponitaj aliaj decidoj submetotaj al voĉdono

Tagordo de la ĜA:

- publikigo de la rezultoj de la voĉdonado: konsento pri la 2 raporto, elekto de nova komitato
- decido pri la partopreno en la venonta matematika foiro: rete, surloke, ambaŭ?
- decido pri forigi la paĝojn de malaperintaj asocioj: ĉu? (ĉu submetinda al formala voĉdono?)
- prezento de la agadplano por 2021, peti ideojn kaj helpon por novaj projektoj

Organizo de la baloto: ĉiuj membroj voĉdonos nur rete per balotilo, krom la 8 membroj sen retadreso kiuj voĉdonos poŝte.

La komitato kunsidos la 19an de februaro por validigi ĉiun dokumentojn antaŭ la sendo.

Sendo de la dokumentoj:

- La 2 raporto estas disponeblaj en la retejo
- Al ĉiu membro kun retadreso ni sendos mesaĝon kun oficiala invitilo, ligilo al la 2 raporto, informo, ke balotilo sendos mem individuan ligilon por voĉdoni
- Al la 8 membroj sen retadreso ni sendos poŝte: oficialan invitilon, la 2 raporto, paperan balotilon kun 2 kovertoj por voĉdoni poŝte
- La sendado okazu plej malfrue la 20an de februaro.

La reta baloto finiĝos la 18an de marto. La 8 homoj kiuj voĉdonos poŝte devos sendi tiel ke la kovertojn atingu la Ĉerizejon plej malfrue la 18an de marto. Tiel, la rezultoj estos preparitaj la 19an de marto kaj publikigataj la 20an de marto komence de la ĜA.

Nunaj projektoj

- Matematika foiro: okazos almenaŭ rete, mikse se eblos, laŭ la sana krizo. Ni bezonos homfortojn por deĵori kaj surloke kaj rete. Oni mencias videoblogiston kiu pritraktas matematikon en esperanto.

- Kontakti la kolegiojn: GVN kontaktis Aleks André, ni atendu la aŭtunon 2021
- Kontakti la publikajn bibliotekojn: MP devas klarigi kiel alparoli ilin, ni atendu la aŭtunon 2021
- Subglasoj: GVN havas la dosieron, la modelo estas elektita, ni atendu la fino de la sana krizo kaj kundividos la elspezon kun Esperanto 94.
- Ekspozicio pri Péraire: GVN bezonas prilabori en la kelo de la Ĉerizejo sed ne havas ŝlosilon. Problemo baldaŭ solvita.
- Paĝmarkilo: la modelo estis elektita, PG havas la prezoliston: 58€ por 500 ekzempleroj, 88€ por 1.000 ekzempleroj. Ni decidis mendi 1.000 ekzemplerojn. Marianne mendos kaj la asocio repagos ŝin. Ni disdonos la paĝmarkilojn en budoj (kiel la kalendaretoj) kaj en la libroservo (en libro aĉetita).
- Staĝano: projekto ne plu aktuala: se ni iam havos projekton kun laboro farebla de staĝano, ni denove pripensos.
- Donaco de libroj al la venonta multlingva biblioteko Livre Ensemble (MP): ni atendu la decidon krei la bibliotekon
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "place des arts"): la intervjuo de DL publikiĝis en la informletero, DL donis librojn, la prelego de DL kaj LPI planita 27/01/21 estas prokrastata sine die.
- Muzeo Mundolingua : nenio nova.
- Sendo de letero al la liceoj franciliaj: nenio.

Novaj projektoj

- Legklubo, proponita de MG. Tutretaj eventoj. Inviti verkiston aŭ fakulon pri literaturo por paroli pri libro (el siaj se temas pri verkisto), unu monaton post la anonco, tiel la partoprenontoj estus konsiderataj kiel legintoj de la libro. MG proponos al la romanoj partopreni la organizadon de la eventoj. Ekzemploj: Said Baluĉi pri sia libro libere elŝutebla, François pri sia disertacio? Laure pri siaj noveloj rete legeblaj en verkoj.com.
- Espéranto Café croissant: GVN provos renovigi la eventojn, tutrete, laŭ etoso de videoludo, per nova ilo.

Estontaj kunsidoj

- KK por finvalidigi la dokumentojn sendotajn por la ĜA: 19/02/21 7a ptm
- ĜA: 20/03/21 2a-4a ptm
- KK tuj poste, la novelektita komitato elektu la novan estraron: 20/03/21 4a-5a ptm